




Nov-Zelando parte trovita, 1663



Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 2001
Numero 49 (vol. 9, no. 1)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 49 (volumo 9, numero 1), Januaro-Februaro 2001

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: donaldbroadribb@mac.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo,
143 Lawson St Redfern, NSW 2016,
Aŭstralio. E-poŝte:
libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towomba Road,
Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte:
hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri ...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

Ekskluzive: La nova aspekto de *Eŭropo* je la komenco de la nova jarmilo. — Raportas (montras?) Odlo Bokserp. V. paĝon 26.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

- La ĉefministro kiu malaperis
(Patriŝa Harkin) 4
- Al la Esperantistoj renkonte (Franciska Toubale)..... 5
- Miaj fruaj jaroj en Dubbo NSW
(Kep Enderby)..... 9
- Diversaĵoj 10
- Skribas la legantoj 18
(Andreo Penk, Margaret Furness)
- El la regionoj..... 19
- Pri la Esperanta gramatiko, parto 2
(Donald Broadribb)..... 20
- Trevor Steele premiita 22
- E-poŝt- kaj -retadreso de Aŭstralaziaj
Esperantistoj 23
- La novaj jarcento kaj jarmilo (Odlo
Bokserp..... 26

Recenzoj:

- La vidvino kaj la profesoro* (recenzas
Donald Broadribb 3
- ANZED* (fino) (rec. Marcel Leereveld) 11
Komentas Donald Rogers 14
- Nove aperis 17

English Supplement

Esperanto sub la Suda Kruco estas legebla per la Interreto ĉe:

http://www.netword.com/*esk

Limdato por artikoloj por la marta numero: 16 februaro.

LA VIDVINO KAJ LA PROFESORO

Recenzas Donald Broadribb



Ronald Cecil Gates: *La vidvino kaj la profesoro*. Vieno: I.E.M., 1997. 132p., broŝ. Prezo: \$17.30 ĉe la Libro servo de AEA. Takso: ☹☹☹

De longe nia membro kaj AEA-prezidanto Ronald Gates estas konata kiel aŭtoro de krimrakontoj, kaj li akiris meritatan reputacion pro ili. Per ĉi tiu romano li pruvus sian kapablon verki romanon malpli facile klasifikeblan. T.e. li verkis sengenran romanon, kaj tion li faris tre kompetente — eĉ majstre.

La vidvino de la titolo estas Izabela, juna virino kiu edziniĝis antaŭ nelonge, kaj kies edzo mortis antaŭ ol ŝi informiĝis pri eĉ liaj plej etaj detaloj.¹

La profesoro nomiĝas Patriko; ku estas profesoro de ekonomiko ĉe Aŭstralia universitato. La epoko estas la preskaŭ-nuna, dum kiu oni diskutadis la enkondukon de la GST, t.e. la sistemo imposti elspezojn, en Aŭstralio. Kelkrilate Gates karakterizas ĉi tiun profesoron surbaze de siaj

propraj spertoj, sed, kiel avertas la aŭtoro, ne supozu ke li mem ja estas la priverkato.

Patriko ĵus finis (laŭ lia supozo) fianĉecon kun virino en Londono, kaj revenis al Aŭstralio, espereble por ĉiam postlasante ŝin.

Hazarde Patriko renkontas Izabelan ĉe trajnstacio, kaj ili kune veturas entrajne. Izabela estas bibliotekistino, kiu devas komenci novan postenon en nova urbo. Dum la veturo ŝi rakontas al Patriko iom pri siaj lastatempaj spertoj, precipe pri sia strange mallonga edzineco.

La detaloj de la morto de la edzo de la vidvino instigas Patrikon enketi ĉe la policejo. Polica detektivo, kiun li konas, transprenas la taskon detale enketi pri la morto. Tiurilate, la romano estas krimrakonto.

Tamen, plej okupas la atenton de la leganto, kaj la plej multajn paĝojn, la karaktero de la profesoro, kaj (iom malpli) tiu de la vidvino. Pri ĉi tio brilas la verkspirito de Ron Gates, kiu sukcesas krei por ni tute kredeblajn profesoron kaj vidvinon, kiujn ni pli-malpli intime ekkonas dum la turniĝo de la paĝoj. Oni povas legi la verkon kiel amromanon, talente prezentatan al ni dum Patriko strebas forgesi sian Londonan eksfianĉinon kaj interesiĝas pli kaj pli pri Izabela.

Pli detale mi ne deziras konigi al vi la romanon. Mem legu kaj ĝuu ĝin: vi trovos ĝin tre bonkvalita literaturaĵo, pri kiu la aŭtoro rajtas fieri. □



Ron Gates

¹ Ĉu ne kredeblas? Tamen, tiaj aferoj okazas! Antaŭ pluraj jardekoj, en Melbourne, mi intervjuis maljunan virinon kies familia nomo estis identa kun la mia. Mi esperis informiĝi pri la granda grupo da Broadribb-oj en Aŭstralio. Sed ve! Mi trovis ke ŝi edzigis sian viron nomitan Broadribb nur du semajnojn post renkonti lin...kaj li mortis pro kormalsano jam la unuan matenon post la geedziĝo, tiel ke ŝi sciis tute neniom pri li. — ■

LA ĈEFMINISTRO KIU MALAPERIS

de Patriŝa Harkin

Homoj ĉirkaŭ la terglobo bone scias ke la plimulto de Aŭstralianoj ŝatas ekskursi al la plaĝo, ĉu por naĝi, ĉu por promeni, sunbaniĝi, pikniki, ktp. Sed kiu el ni imagis ke nia ĉefministro senaverte, senspure dronos en la surfo? Tiu katastrofo okazis dum ferio kun liaj familio kaj geamikoj ĉe la belega Strando Cheviot en la ŝtato Viktorio.



Harold Holt

La ĉefministro estis la 59-jaraĝa Harold Holt, kaj la jaro estis 1967. La danĝera subfluo ĉe la Strando Cheviot estis bone konata kiel evitinda naĝloko, kaj la plimulto de liaj geamikoj kaj familianoj rifuzis eniri tiun akvon. Sed Harold Holt sentime enplonĝis kaj fornaĝis, kune kun juna amiko Alan Stewart.

Je kelka distanco de la marbordo, Stewart sentis fortegan kontraŭfluan kaj rapide naĝis returne al la marbordo. Holt, tamen, senzorge antaŭen sin pelis. Subite la akvo ĉirkaŭ li ek-tumultis kaj bolis kvazaŭ kaldrono. Holt malaperis.

Centoj da plonĝistoj serĉis subakve, soldatoj kontrolis laŭ la sablo ĝis distanco de 48 kilometroj, kaj helikopteroj malalte flugis super la ondoj, sed malgraŭ plena sestaga serĉado, lia kadavro ne estis trovita.

La popolo komencis demandi:

- kial la ĉefministro naĝis ĉe tiu famaĉa loko?
- ĉu li sin mortigis pro politika premado? (Li ja favoris la partoprenon de Aŭstralio en la Vietnam milito.)
- ĉu estas vera la onidiĝo ke li mon-

tris indikojn de baldaŭa nervokolapso?

En 1983, libro titolita *La ĉefministro estis spiono*, verkita de Anthony Grey, asertis ke Holt ne dronis, sed ke li naĝis al submara ŝipo kiu atendis lin, kaj rapide estis forprenita al Ĉinio. La aŭtoro ankaŭ asertis ke Holt favoris la socialisman sistemon, ke li transdonis informojn al Ĉinio, kaj kiam li timis baldaŭan malkovrigon, li aranĝis sian eskapon.

Tiu pretendo ridigis la popolon, ĉar ĝi ŝajnis esti tute nekredebla. Tamen, pro la manko de kadavro, la imago povas vagi laŭvole. □



POR RIDIGI VIN



Iun tagon ges-roj Linnane ordigis la subtegmentejon. S-ro Linnane trovis kvitancon de la loka ŝuriparisto. La kvitanco estis datita antaŭ 11 jaroj. Ili ambaŭ ridis provante memori kiu el ili forĝis hejmen porti la ŝuojn antaŭ tiom da tempo.

“Ĉu vi kredas ke la ŝuoj ankoraŭ estas en la vendejo?” demandis Brendan Linnane.

“Verŝajne ne,” diris la aminda edzino de Brendan.

“Indas provi,” diris Brendan, enpoŝigante la kvitancon.

Li enaŭtigis kaj iris al la ŝuvendejo. Seriozvizaĝe li donis al la ŝuisto la kvitancon. Same seriozvizaĝe la ŝuisto diris, “nur unu momenton, mi devas unue serĉi ilin.” Li malaperis en malhelan angulon de la vendejo. Du minutojn poste li elkriis, “jen, mi trovis ilin!”

“Ĉu vere?” kriis Brendan. “Bone, ĉe bonege! Kiu kredus ke ili ankoraŭ estas ĉi tie post tiom da tempo?”

Revenis al la vendotablo la ŝuisto sen la ŝuoj. “Ili estos pretaj jaŭdon,” li diris.

(El *Tamen Plu*)

AL LA ESPERANTISTOJ RENKONTE

de Franciska Toubale

Ankaŭ en 2000 mi pasigis la Aŭstralian vintron en Eŭropo. Mia unua celo estis ĉeesti la SAT-kongreson en Moskvo. Sed unue mi devis akiri vizon. En Parizo la veturontoj vicas surstrate laŭlonge de la kradoj de la ambasadejo, negrave ĉu pluvas, ĉu ventas, ĉu neĝas, inter la 9a kaj la 12a matene. Ĉiun duonhoron kelkaj bonfortunuloj estas invitataj eniri. Post semajno oni revenas por repreni la pasporton kun vizo. Kial la kondiĉoj estas tiom malagrablaj? Ĉu Rusio kaj Francio simple reciprokas saman proceduron? Mi eniris la ambasadejon la duan matenon da atendado tuj antaŭ la 12a horo. Uf!

Pro manko de tempo mi atingis Moskvon per la flugkaravano organizita en Parizo, kio faciligis la unuajn paŝojn en Rusio. Pro la malgranda nombro da aliĝintoj (120, el kiuj 85 efektive venis), ni tranoktis en INTOURIST-hotelo iom for de la centro. Ĝi konsistis el kvar grandaj konstruaĵoj. Antaŭ ol ricevi la ŝlosilon de la ĉambro, necesas iri al kvar ĝiĉetoj. Finfine estas stampite sur la vizo kie oni tranoktas kune kun la daŭro de la restado. Oni devas trapasi ankaŭ la homan barilon antaŭ la lifto kaj deĵorantino je ĉiu etaĝo respondecas pri la ŝlosiloj.

En apuda konstruaĵo loĝas viroj el Afganistano, ekde la milito inter Rusio kaj Afganistano. Ĝis nun ili ricevis nenian statuson, sed esperas ke Kanado akceptos ilin.

La kongresejo situas en industria kvartalo de Mosko, apud la aŭtomobil-fabrika Liĥaĉov (ni vizitis ĝin dum la kongreso, kio ebligis renkonton kun sindikatoj) en la Ŝtata Indus-

tria Universitato, kie la studentoj devige lernas Esperanton kaj volonte helpis dum la tuta aranĝo, kune kun la gejunuloj de la movado "Teorio de Feliĉo", kiuj ankaŭ lernas Esperanton.

La partoprenantoj ne eskapis de la laborkunsidoj por viziti Moskvon, sed saĝe atendis la ekskursojn ĉefe sub gvidado de lerta Esperantistino Nataŝa Arloviĉ.

Tiel la laboro glate antaŭeniris, kvankam solvoj ne estis trovitaj por prosperigi la Asocion aŭ por plibonigi la kondiĉojn de ekspluatataj laboristoj tra la mondo.

Prelegoj pri diversaj temoj: homaj rajtoj, la verdulaj Esperantistoj, la Sovetia Esperanto-movado, la aborigenoj de Aŭstralio (prelegis Sandor Horvat), okazis dum la posttagmezo.

La distraj vesperoj donis oportunon aŭskulti, i.a., la genian dekkvarjaragan pianoludiston A.Korobejnikov.

La kongreso en Moskvo restos agrabla en mia membro, bone organizita, amikema kongreso, en urbo ne tiom danĝera kiel oni priskribas en la amaskomunikiloj.

Mi revenis al Prizo malrapide, per trajno.

Min surprizis konstati ke la landlimo inter Rusio la Bjelorusio estis nuligita. Oni tamen bezonas vizon por eliri Bjelusion kaj eniri Pollandon.

Kiel membro de la teamo en la Esperanta radioprogramo 3ZZZ, mi ne povis maltrafi viziton al Radio Polonio dum mia restado en Varsovio, kaj poste al Radio Aŭstrio en Vieno. Ambaŭ stacioj estas imponaj konstruaĵoj, en kiuj laboras profesiuloj. Pro tio la



En studio de Radio Pollando.

kondiĉoj bonas, kvankam la ekipaĵaro por la Esperanto-programo en Varsovio estas iom malnova.

La stacio en Vieno estas komuna por la radio kaj televido. Ĝi estas preskaŭ apuda urbeto, kun butikoj, banko, kaj propra aparta sistemo.

Mi jam sciis pro malagrabra sperto ke ne eblas sen vizo traveturi landon per trajno. Sed mi aldonas konsilon: kontrolu la irotan vojon, se vi ne deziras esti eltrajngita meze de la nokto apud landlimo kie troviĝas nenio. Mi ne anticipis ke la trajno el Varsovio trairos ĉirkaŭ 50 kilometrojn en Ĉeĥa teritorio por atingi Bratislavon, do min renkontis tiu sorto.

Por daŭrigi la veturon ĉirkaŭ la Ĉeĥan landlimon, mi trafis kvar trajnojn kaj du busojn tra la montaro. Mi tamen finfine atingis Ĉadĉa-n, la celtan urbon, sed tio fuŝis mian plan-

on en Slovakio.

Post kelkaj tagoj da ripozo en Francio, mi denove pakis mian valizon por trovi la novan Esperantistan centron en Britio: Barlastono. Pro la malprecizaj informoj akiritaj de mia filino, kiu hazarde rigardis televidan programon pri Esperanto en la ĉirkaŭaĵo de Birmingham, mi ludis trezorĉasadon dum tuta tago da pluvo.

Nun la klientoj de la du drinkejoj kaj de la hotelo scias ke ilia vilaĝo famas pro regulaj renkontoj de Esperantistoj. Dank' al la poŝtofiĉejo, mi trovis la kolezion Wedgwood Memorial, kie la direktoro Derek Tatton okazigas seminariojn vizitatajn de famaj Esperantistoj kiaj Marjorie Boulton, Paul Gubbins, Renato Corsetti, Rosalyn Edwards, ktp.

En 2001, ĝuste dum la Somerlernejo en Melburno, oni teatrumos en Barlastono; tio estas unu el la tieaj ŝatataj okupoj. Sed la tuta programo ankoraŭ ne estas konata. La slogano de la organizantoj estas: "Ni provizas la kadron, vi la bildon".

Pro vendiĝo de la klubejo en Londono, la libroj de la Londona biblioteko baldaŭ migros al Barlastono.

Mi ne povis rezisti ĉeeston en la kvina "Plouezeka renkonto" en Bretonio, antaŭ ol forflugi al Aŭstralio. Al tiu urbeto apud la maro alvenis 120 Esperantistoj, ĉefe el Francio, sed ankaŭ el Hispanio, Germanio, Litovio, Bulgario, kaj Usono, por studi Esperanton sub la gvidado de Atilio Orellana Rojas, Denis Keefe, Jean Pierre Ducloyer aŭ Sabine Trenner, kaj ĥorkanti, teatrumi, danci, viziti la regionon. Mi aparte ŝatas la ideon intermiksiĝi kun la loĝantoj kaj feriantoj kiel eble plej ofte. Tiel la Esperantistoj estas bonvenaj kaj ambaŭ grupoj ĝuas la eventon.



Sino Qui eliras la tunelon.

Por dividi la longan sidadon en aviadilo de Parizo al Melburno, mi haltis dumvoje en Hô Chi Minh, kaj retrovis la Esperantistojn kun kiuj mi interkonatiĝis kadre de la Dua Azia Kongreso. Ekde tiam Esperanto bone fartas en Vietnamo.

Mi tuj rimarkis sur la stratoj multajn butikojn ornamitajn per brile ruĝaj kaj oraj aĵoj. Ili estas ludiloj kiujn la infanoj ricevas en aŭtuna festo dum la oka monato de la luna kalendaro. La plenkreskuloj guas gustumadi specialajn kukojn en kies mezo estas la flava parto de anasovo. Mi estis tre ĉagrenita kiam mi devis rifuzi kelkajn el tiuj kukoj, speciale bakitajn por mi de Esperantistino, pro la leĝoj de Aŭstralio koncerne importaĵojn.

Ne eblas resti en Hô Chi Minh sen pli profundigi sian konon pri la

konfliktoj — unue kun Francio, poste Usono —, vizitante la militmuzeon, kiu ankaŭ montras kiel la protestantoj tra la mondo helpis atingi pacon. (Estas ekspoziciata ankaŭ libro en Esperanto, donacita de Japana delegacio.)

Impresis min vizito al la tuneloj en Cu Chi: ĉirkaŭ 200 kilometroj da fosaĵoj en kiuj loĝis la Vietnamanoj dum la milito. Oni iom larĝigis ilin en kelkaj partoj por ebligi la viziton, sed ili estis intence mallarĝaj por ke la Usonanoj ne povu eniri.

Dum ni rigardis vidbendon pri la vivo en la tuneloj, afable Esperantigitan de Esperantistino de nia Grupo, S-ino Qui, ekkriis turisto kun rido: “Mi komprenas ĉion!” Ŝi estis Francino kiu scipovas ankaŭ la Latinan, la Hispanan kaj la Anglan. Malgraŭ ŝia konstato ke la lingvo iniciita de Zamenhof bone vivas, utilas, kaj permesis al ŝi lerni multe pli pri la tuneloj, verŝajne ŝi daŭre hezitas inter la forto de ŝiaj antaŭjuĝoj koncerne Esperanton kaj la vero kiu malkovriĝis antaŭ ŝi.

Pli agrabla ol Hô Chi Minh estis la urbo de Sinjoro Boi, Vung Tau, apud la marbordo inter montoj. Sur unu el ili troviĝas la dua plej granda statuo pri Jesuo Kristo en la mondo. Grimpu en ties manikojn por admiri la ĉirkaŭaĵon, se la suno kaj malsekeco ankoraŭ ne forprenis ĉiujn viajn fortojn. Se vi ne kapablas, ripozu en restoracio gustumante multnombrajn pladojn preparitajn el fiŝoj aŭ konko-fiŝoj.

La filino de Boi kaj ŝia amikino lernas Esperanton. Ĉu komenco de aktiva grupo tie?

Mi revenis al Melburno fortigite de la amikeco kiun mi renkontis ĉie dum tiuj tri monatoj. □



Ponto en Vietnamo ekkonstruata en junio 1997, donace, de Aŭstralianoj.
Ĝi estis malfermita la 21an de majo 2000.



MIAJ FRUAJ JAROJ EN DUBBO NSW de Kep Enderby

Mi naskiĝis en Dubbo en la jaro 1926. Mia patro estis sukcesa posedanto de laktaĵa butikio, kaj la familio (patrino kaj unu plijuna frato) loĝis tre komforte en parto de la konstruaĵo malantaŭ la butikio.

Trans la strato, fronte al nia butikio en Victoria Park, estis granda militmonumento konstruita post la unua mondmilito. Kiam oni rigardis antaŭen: ĉe nia dekstra flanko estis Church Street, kaj maldekstre, tuj apude, estis la nun detruita kinejo Monarch.

Mi unue ĉeestis la lokan elementan lernejon kaj poste la altlernejon Dubbo ĝis la jaro 1943, kiam mi atingis 17 jarojn, kaj gajnis la abiturientan diplomon. Pro multaj kialoj kaj distraĵoj, bedaŭrinde, mi ne estis tiam tia bona studento kia poste plaĉus al mi esti. Iri kaj reveni al ambaŭ lernejoj estis facila afero. Mi nur piediris tien.

Dubbo, kompreneble, dum tiuj jaroj estis tre malsama urbo ol ĝi nun estas. Mi opinias ke la nuna loĝantaro proksimas al ĉirkaŭ 40 000. Tiam ĝi proksimis al 8 000, se oni ne enmetis en la kalkulon la nombron da soldatoj en la apuda tiama armea tendaro kaj la nombro da flugarmeanoj en la enurba flugarmeadepono.

La distraĵoj kiuj tiom interrompis mian studadon estis, parte, mia laborado ĉiunokte escepte de dimanĉe, en la kinejo, vendante glaciaĵojn kaj ĉokoladaĵojn, kaj tial spektis ĉiujn kinfilmojn du/tri fojojn.

Ankaŭ, mi entuziasmiĝis pri aviadilaj aferoj kaj multe aktivis en la loka 25-a kadeta eskadro de la

flugarmeo (ATC) en Dubbo.

Dum tiuj jaroj, egale kaj ege ekcitate por mi kiel junulo, mi flugis kiel pasaĝero kun Kingsford Smith en lia fama aviadilo "La Suda Kruco", kiam li surterigis ĝin en kampo okcidente de kaj malantaŭ Burke Hill.

Post la fino de la fama Flugkonkuro de la Brita Imperio, alia aviadilo kiu partoprenis en tiu konkuro surterigis dum sia reiro al Britio, sur alia kampo ie oriente de la urbo.

Dum 1942/3, kadre de mia aktivado en la ATC, mi helpis bonvenigi la faman flugarmeano bomb-aviadilon "GX por Georgo" kiam ĝi vizitis Dubbo-n kaj surterigis samloke kiel Kingsford Smith. Ĝi celis entuziasmiĝi onin doni financajn kontribuojn por subteni la militon. Dubbo tiam ne havis flughavenon!

Aldone al tiuj ĉi aferoj, anstataŭ ludi unu el la kutimaj teamaj sportoj en la altlernejo, mi ludis golfon. Ofte mi biciklis al la golfejo kun la golfbastonoj sur mia dorso.

Ludi golfon tiutempe, por junulo kiel mi, estis ege nekutime. Mian ludadon instigis la fakto ke mia patro ekludis golfon pro sanigaj kialoj, kaj petis ke mi akompanu lin al la golfejo, kiu tiutempe aspektis tute malsama ol nun.

La ĉefinstruisto de la altlernejo konsentis ke mi ludu golfon. Ĝis la ĉesigo de ĉampionaj golfaj eventoj pro la milito, mi sukcesis ĉampioniĝi en multaj eventoj, kontraŭ plenaĝuloj.

En, mi opinias 1942/3, mi eĉ estis petita ludi publike kontraŭ la fama Aŭstralia profesia golf-ĉampiono Billy Bolger, por helpi lokan almozan organizon. Billy Bolger tiam servadis

en la armeo kaj deĵoris en la armea tendaro apud Dubbo.

Kiel mi diris, mi opinias ke loĝi en Dubbo tiam estis travivi tute malsaman sperton ol loĝi tie nun.

Antaŭ ol fini ĉi tiun rakonton, mi rimarku ke mia patro havis fraton, iomete pli aĝan ol li, kiu posedis similan butikon en Wellington NSW nelongdistance for de Dubbo. Mia onklo estis Esperantisto kaj multajn jarojn poste mi lernis ke dum tiuj jaroj li fervore aktivis kiel delegito de UEA kaj de IEL (Internacia Esperanto-Ligo); kaj ke dum la persekutado de la Judoj farita de la Hitleristoj en

Germanio, li aktivis helpante Judajn familojn eskapi kaj enmigri Aŭstralion.

Mi memoras ke iam dum la malfruaj 1930-aj jaroj mi vizitis lin kaj ke li pruntedonis al mi kelkajn Esperantolibrojn, kiujn mi entuziasme voris ĝis kiam la aliaj jam menciitaj distraĵoj forlogis min kaj poste venis la milto.

Tiu forlogado daŭris ĝis mi hazarde, kun la helpo de Ralph Harry, retrovis Esperanton pli ol 50 jarojn poste.

Nun mi estas prezidanto de UEA! Tia estas la vivo, ĉu ne?

[Laŭ *Telopeo*, nov. 2000]

DIVERSAĴOJ

- En la urbo Lodz en Pollando estis realigita la ideo memorigi 33 personojn meritajn por la urbo. Sur la muro de domo staranta ĉe Piotrkowska Strato, la ĉefa strato de la malnova parto de la urbo, aperas granda fresko. Pentraĵo imitas la muron de konstruaĵo kun pordego, balkonoj kaj fenestroj tra kiuj rigardas historiaj personoj.

Inter portretoj de eminentaj homoj de kulturo, scienco, politiko kaj la Lodza industrio, oni povas vidi ankaŭ portreton de Ludoviko Zamenhof.

La pentraĵo aperis dank' al iniciato de la Lodza redakcio de la tutpollanda ĵurnalo *Gazeta Wyborcza*. Ĝi vaste raportis sur sia titolpaĝo de la loka kaj la tutlanda eldonoj pri la inaŭguro de la fresko, kiu okazis la 3-an de novembro 2000. La magistratanoj konsideras la pentraĵon bonega formo de reklamo kaj eduko.

Kontribuis: Aleksander Kaminski
<kamolek@poczta.onet.pl>

[---fonto: ret-info]



POR RIDIGI
VIN



[El lastatempe aperinta “Letero al la Redaktoro” de ĵurnalo Aŭstralia]:

Iun vesperon mi aŭdis bruon el ekster mia domo, kaj nia sekureca lampo eklumiĝis. Mi eliris, kaj jen estas atakanto. Mi demandis al li ĉu li estas armita. Li diris ke li havas basbalan batilon. Mi eniris la domon por serĉi batilon similan al tiu, kiun li havas.

Mi ne povis trovi tion, do mi telefonis al amiko mia kiu posedas sportajvendejon, kaj li volonte eliris el sia vendejo kaj portis al mi novan basbalan batilon.

Mi turnis min al la atakanto kaj diris al li: “Nun ni estas egale armitaj, komencu ataki.”

Li diris ke li havas ankaŭ pafilon.

Mi diris ke tiuokaze, plibone estos ke li eniru mian domon kaj prenu kion ajn li volas, ĉar al mi la leĝo malpermesas posedi pafilon.

[Kontribuis Franko Bariĉ]

Recenzo pri *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary*

de Marcel Leereveld

(parto tri)

La neologismoj

Ili dividiĝas en tri grupojn:

1) Precipe biologiaj nomoj adaptitaj el (Latin-Grekaj) sciencaj nomoj: *mirmekobo*, *ceratodo*, *pretroĵko*.

2) Biologiaj kaj aliaj indiĝenaj k.a. vortoj adaptitaj precipe el Indiĝenaj (sed ankaŭ Anglaj) nomoj: *huplao*, *kulibao*, *premiero*.

3) La ĝenerale uzataj neologismoj nenecesaj (ekz. *bunta* por *diverskolora*).

La unua grupo estas laŭ mi nenecesa, ĉar ili uzatas nur tre limigite en la mondliteraturo kaj en la Aŭstralia. En sciencaj medioj kaj verkoj oni normale uzas la Latinajn/Grekajn nomojn, eĉ en Esperantaj tekstoj. En etnaj lingvoj oni kutime uzas tiujn, por lokaj nocioj, vortojn en la tekstoj kiel fremdvortojn, kiel *edelweiss* kaj *jihad*. Kial ni ne povas fari la samon en Esperanto? Do jen *edelweiss* kaj *jihad* kaj boomerang, jen *Leontopodium alpinum* kaj (Islama) sankta milito kaj revenĵetilo? Tiel la oficiala Esperanto-vortaro ne bezonos dekobligi per ĉiuj tiuj miloj da lokaj specialaĵoj de ĉiu el la centoj da anguloj de la mondo. Eĉ se niaj vortaristoj deziras eksplodigi la vortaron, ili devas esti konsekvencaj, kaj ne fari esceptojn kiel faras la nova vortareto: drikuro por *drongo*, flipflopo por *kaŭĉuka zorio*, Novzelanda agato por *kaŭrio*, *apterigo* por *kivio*, *aktinidio* por *kivifrukto*, faskolarkto por *koalo*, *dacelo* por *kukaburo*, lejpoa por *lovano*, njuzilda por la naŭza "Nozoa Angliŝo", Sangaŭstraliano por la

same dekadenca "Aŭso", kaj "strajna" por la neesperanteca "Aŭsa Angliŝo" (sed ilia Taswegian estas simple *Tasmaniano!*).

La dua grupo ne enhavas multajn, sed vere estu alternativa metodo al la unua grupo: aŭ oni neologisme kreu nur sciencajn adaptiĝojn, laŭ la unua grupo; aŭ oni kreu nur neologismojn el la Anglaj (kaj indiĝenaj) vortoj por la internacie gravaj aferoj, kaj lasu la neinternaciecajn netradukitaj. En la lasta kazo oni havus nur malgrandan balaston da neologismoj, kiaj *kanguro* kaj *brolgo*¹.

La tria grupo estas la plej forte Esperanto-degenera; ili nenecese kaj grave polucias la lingvon. Vortaristoj amas ilin, ĉar ili sentas kvazaŭ ili estas la kreantoj de la lingvo², kaj ĉar ili ŝatas vortojn kaj grandajn kvantojn. En tiu aspekto la vortaristoj estas la malamikoj de Esperanto kaj ĝin murdas. Jen la nenecesaj neologismoj en ĉi tiu verko, kun provo de Esperantecaj alternativoj oficialvortaj:

Puga = postaĵa

Aborigeno = (Aŭstralia) indiĝeno

Brodkasta = disaŭdiga

Tenebra = malluma

Antarkta = Sudpolusa (vidu *PIV*)

Pongo = homecsimio

Konvikti = krimkulpigi

Kivio = apterigo

Aŭsano = Aŭstraliano

Premiero = provinca ĉefministro

Ŝedo = ŝirmkonstruaĵo

¹La vortareto donas, ial, "broлга gruo" por BROLGA — ■

²Ĉi tiu emo estas speciale danĝera en vortaro nacilingva-Esperanto, ĉar la uzantoj de la vortaro sentencie uzas vortojn kiujn iliaj legantoj efektive ne konas kaj ne povas trovi en siaj propraj vortaroj. — ■

Pansbendo = vundbandaĝeto
Bejlo = (barileta) transtrabeto
Bovuko = kastrobovo
Bandikuto = paramelo
Barbekuo = ekstera rostilo
Barbekuaĵo = eksterrostaĵo
Adhera = gluiĝa
Baramundo = skleropago
Strandĵipo = aŭtomobileto
Greso = graminio
Motorciklo (= ciklo de motoro) =
 motorbiciklo
Bilabongo = neflua riverbranĉo
Bilipoto = tepoteto, kampada bol-
 poto
Adheras = fiksiĝas
Kanako = Pacifikulo
Hortisto = fruktkulturisto
Fungicido = fungmortigaĵo
Nana = malalta
Vori = krude manĝi
Bogongo = tineego
Bondajo = Bondi-marbordo
Mopoka strigo = Novzelanda strigo
Vokto = laborkontrolisto, ĉefeto,
 submastro
Flaŭro = vegetaĵaro
Skovelo = botelpurigbroso
Bunta = varikolora
Noca = malutila
Plataĝo = platajrando
Posumo = falanĝeredo
Buĝerio = melopsitako, papageto
Bugrulo = virseksemulo¹
Frustracio = malkontentiĝo
Bangalo = (unuetaĝa) domo
Bunĝiplonĝi = ŝnuregplonĝi
Boŝo = sovaĝejo, forejo, arbarejo,
 neurbejo, enlandejo, malurbo,
 arbustejo, kamparo, urbforejo,
 nekultivejo

Altitudo = (absoluta) alteco
Forstisto = arbarlaboristo
Boŝmarŝi = sovaĝejpromeni
Dornoza arbusto = dornarbusto
Gengenga kakatuo = lima *kakat-
 uo²
Galaha kakatuo = roza *kakatuo
Pirogo = trunk-*kanuo
Pahio = *kanuego
Taŭro = bienbino
Novsiluro = *neossiluro
Plotoso = ploto
Fridujo = malvarmujo
Renoma = fama, nobla³
Fulva = brunflava, malhelflava
Rufa = ruĝflava
Jetono = pseŭdomonero
Kormorano (= ano de la moroj pri
 la koro) = *kormorento
Murplako = murtegaĵo
Sentinelo = gardstaranto
Taro = *kolokasio, *kolokasiradiko
Setli = ekkolonii, novokupi, sin
 novestabli, novloĝi
Kompano = kunulo
Konviktito = kulpjuĝito
Kulibao = etkovrila eŭkalko
Koroborio = (indiĝena) dancfestoj
Frugilega = fruktokolekta
Konteo = distrikto
Konciliacio (= konsiliada) = konsil-
 iĝado
Pado = vojeto
Kraŭli = alternece naĝi, rampnaĝi
Rojto = eta rivereto
Kribaĝo = kombinkartludo
Dornoza = dornhava (vidu *PAG-*
on!)
Damo = Kavalirino
Dampro = cindre bakita pano
Sozio = similulo

¹ Ne nepre; la Angla “buggery” havas plurajn signifojn, kaj povas signifi anus-koitadon, neniel nepre plene virseksan. — ■

² * = neoficiala termino — ■

³ Kelkaj argumentas ke tiu senco de “renoma” deriviĝas el “re-noma” (kp. *PIV*) — ■

- Depresio* = ekonomia kriz(et)o
Deprimo = (psika) malvigleco
Diĝeriduo = Aŭstralia muzikblovilo
Emuo = *dromαιο
Sismo = tertremo
Mariĥuano = kanabdrogo
Stretfolia = mallarĝfolia
Ĵaraho = marĝena, lima, randa eŭkalipto)
Zorio = sandaleto
Futbalo = piedpilkado
Rugbeo = luktopilkado
Fridigi = malvarmigi
Agresi = ataki
Ĉevaluko = kastroĉevalo
Ŝika = eleganta
Glisi = ŝvebiri
Gresarbo = *ksantoreo
Arida = seka
Stirebla = direktebla
Sarusa = *antigona
Havajkio = prahejm(land)o
Ĵokeo = vetrajdisto
Huplao = ringĵetludo
Jupitero = *Jupitro
Hidroelekto = akvelekto
Jabirua = Azia
Halukso = pieddikfingro
Aromoza = aroma
Lamingtono = *lamington-kuko
Laŭteniso = teniso
Neco = necesejo
Lokvato = *eriototrio
Lorikito = papageto
Sinekuro = sendediĉa ofico
Valabio = kangurueto
Verukoza = verukeca
Malversacii = al si sifoni monon
Marigreja bovo = *Murray-bovo
Kurta = mallonga
Pinakoteko = artmuzeo
Piĝina = Anglolingvida
Prizono = malliberejo
Muskoloza = muskola
Unulena ponto = unuireja ponto
Pavlovo = *fruktmerlingo
Karakto = vortsigno, vortbildo, litero
Papajo = kariko
Skalena = triangula
Karmezina = malhelruĝa
Dilata = disema
Grenadilo = ronda pasifloro
Iriza = ĉielarka
Papaŭo = asimino
Lukri = salajriĝi, perlabori
Aperta = malferma
Izocela = simetria
Pikniko = ekskursu manĝo
Preniva = prenpoŝto
Ksenofoba = eksterlandanmalami-ka
Kombajno = grenmaŝino
Riĥtera Skalo = tertremskalio
Prioritata rajto = veturplejrajto, antaŭrajto
Bukanita = brulsekigita
Baramundo = skleropago
Veprejo = sovaĝa arbustejo
Skono = sensukera kuko
Makadama = asfalta
Makuloza = makulhava
Sekundara = industria
Manufaktura = maŝino, fabriko
Selekti = elelekti
Teamo = sportanaro, kunaro, lud-antaro
Monteĝo = montrando
Lanĉejo = ŝipenakvigejo
Nelica = nepermesita, nerajta
Snuko = *tirsito
Skvaŝo = teniseto, ĉambrotenisio
Konstelacio = stelaro
Ranĉo = brutbieno
Vakero = brutgardisto
Brankardo = malsanulportilo
Ŝorto = pantaloneto
Kargo = transportvaro
Funeralo = funebraĵoj (vidu PIV-on!), funebra solenaĵo
Etimo de = similvorta al
Terciara = triarangita, servada

Feroça = sovaĝatakema
Rarega = maloftega
Oficinala = medicina
Antiseptisa = kontraŭinfekta
Fluso + malfluso = altajdo + fortajdo
Ĝiĉetisto = fenestretra informisto
Sizigia = granda
Gratifiko = rekompencmono
Marstranda = marborda
Tajfuno = *ciklonego
Tre orgojla = tre memŝatega
Veĝemito = legomaĵa panŝmiraĵo
Vitaminazo = *vitaminplena

Stivisto = ŝarĝlaboristo doklaboristo
Floroza = florhava
Ŝafuko = kastroŝafo
Inkludi = inkluzivi
Lanstaplo = lantenejo
Vumero = lancĵetilo
Huligano = stratknabaĉo
Ignamo = *dioskoreradiko

La cetera enhavo de la vortareto estas bona kaj ofte bonega. Mi rekomendas ĝin por kritikema uzado, kaj gratulas la aŭtorojn. □

KOMENTAS DONALD ROGERS

Mi volas komenti pri la polemiko de Marcel Leereveld (*ESK* 47 p.6-9 kaj 48 p.14-17) pri la *Australian & New Zealand Esperanto Dictionary* (ANZED) de Ralph Harry kaj Brian Fox. Kvankam mi konsentas pri iuj el la opinioj de Marcel mi volas diskuti kelkajn pri kiuj mi ne samopiniias kaj pri kiuj mi havas ion laŭ mi dirindan.

La procedaj aspektoj

(2) La Esperanta nomo de Nov-Zelando baziĝas sur internacia nomo: Nuova Zelanda, Nouvelle Zelande, ktp., kaj la Aŭstraliaj ŝtatoj estas bone konataj de multaj jaroj, do oni ne rajtas kulpigi la kompilintojn de ANZED se la nomoj ŝajnas nelogikaj.

(5) Same pri "specio".

(4) En la Esperanta literaturo la nomoj de malpli bone konataj geografiaĵoj (Markolo Cook k.a.) ĝenerale ne estas Esperantigitaj, dum landnomoj preskaŭ ĉiam estas Esperantigitaj. Kuk-Insularo estas lando, do ĝi meritas Esperantan nomon.

(7) La vorto "majno" (la birdo) estas internacia (Hinda: maina). Mi dubas ĉu iu konfuziĝos pri ĉu oni parolas pri la birdo majno aŭ la rivero Majno. Ĉu

majnoj vivas apud la Majno?

(8) La vorto "kivifrukto" ankaŭ estas internacia. Multaj homoj komprenas la ŝercon ke kivifrukto (aktinidio) havas kelkajn ecojn similajn al la birdo kivio (apterigo): ambaŭ estas brunaj, rondaj, tufecaj kaj ne flugipovaj!

Eraroj en la enhavo

La plejmulto de tiuj eroj temas ne pri eraroj sed pri opinioj pri la vortfardo.

(3) "Amaryllis belladona" estas en la Angla kaj kelkaj aliaj lingvo konata kiel "beladona lilio".

(4) Ofte oni uzas adjektivon formitan el la nomo de objekto por montri la koloron kiun tiu objekto kutime havas. Ekzemple: "oranĝa" — havanta la koloron de oranĝo; ankaŭ "ora", "roza".

(5) La akceptita internacia termino por "football" estas "futbalo". Kiam la VFL estos konvinkita renomi sian sporton "Aŭstralian hand-football", tiam ni rekonsideru la Esperantan terminon por Aŭstralia futbalo.

(6) "Daŭrfolia" kaj "falfolia" estas delonge akceptitaj kaj uzataj, do ne

kulpigu la kompilintojn. “Sezonfolia” ne estas pli bona ol “falfolia”. En kiu sezono falas la folioj — en ĉiuj sezonoj?

(8) En sia libro *Kaverno apud la Maro* Bert Potts uzis la vorton “ŝafvojeteto” por “sheeptrack”, la vojeto kiun ŝafoj faras irante. Analogie mi emus uzi “bovovojeteto” por tiu farita de bovoj. “Bovtransportvojo” estas tre longa vorto. Post klarigo “bovovojo” sufiĉas.

(9) “Bovuko” estas kastrita bovo. “Tirbovuko” estas malpli vasta termino por bovuko kiu laboras por homo.¹

(10) La vorto “boŝo” estas sufiĉe internacia² (eĉ la kolonia franca lingvo havas “brousse” por vasta regiono kovrita de arbustoj, ktp). “Boŝo” kaj ĝiaj etnolingvaj ekvivalentoj estas pli larĝaj terminoj ol “sovaĝejo” k.a., do ĝi ampleksas ilin. La koncepto estas ligita kun la nova mondo, kie la tereno estas multe malpli kultivata kaj

neta ol en ekzemple Nederlando, kie oni utiligas preskaŭ ĉiun kvadratan metron.

(11) Taŭga traduko por “fresh water” dependas de la emfazo: “sensala” — kontraste al sala akvo; “trinkakvo” por la uzado; “pura akvo” post purigo de malpura, ktp. Mi foje legis la terminon “dolĉa akvo” kie ĝia signifo estis bongusta trinkakvo. Tamen ĝi estas francismo kaj ne estas strikte vera. “Pura akvo” ankaŭ preskaŭ neniam estas laŭlitere vera.

Kolizioj en vulgaraĵoj nomoj de plantoj kaj bestoj okazas ankaŭ en la Angla kaj aliaj lingvoj. La biologiaj nomoj (t.n. Latinaj nomoj) estas dunomaj (genro kaj specio). Redukti dunoman al ununoma termino ofte kaŭzas koliziojn kiel ĉe “beladono” kaj “eĥio”. Uzi sole la nomon de la genro preskaŭ ĉiam kaŭzas problemojn. Oni povas nomi “*Echium vulgare*” “vulgara eĥio”. La senso de “vulgara” estas taŭga.

(22) “Tolaĵo” probable sufiĉas, sed “manchester” precipe temas pri litolaĵoj.

(23, 28 k.a.) Uzo de -oz estas ebla, sed afero de prefero. Ĝi estas konata vortero.

(27) “Senatomnuklea” ne estas pli bona ol “sennuklea” ĉar ĝi ankaŭ ne indikas ke ĝi temas pri manko de nukleaj armiloj kaj elektro de nukleaj reaktoroj. Ĝi estas iom kompleksa nocio reduktita al termino kiu ne montras la tutan aferon. Tio ofte okazas en vortfarado.

(33) “General store”: ie mi legis “ĉiovendejo”; ĝi estas malgranda magazeno, sed eble tio estas kontraŭdiro.

(35) Por “wind break” Benson havas “ventrompilo”. Laŭ *PIV* “kolŝirmilo” ŝirmas kolon; “manŝirmilo” ŝirm-

¹ Ĉirilate ekzistas speciala problemo. En la Fundamento “bovo” estas difinita: “boeuf | ox | Ochs, Stier”. Pro la difino “ox”, multaj Esperantistoj uzas la vorton “bovo” por la kastrita besto, kaj “virbovo” por la nekastrita. Tamen Marcelo protestas ne pri tio, sed kontraŭ la nelogismo -uk-, kiu ne estas trovebla en *PIV* aŭ aliaj internaciaj vortaroj. La tasko de nacilingva-Esperanta vortaro ne estas proponi tute novajn vortojn, sed konstati la jamnunan uzadon de Esperanto. Se Aŭstralaziano skribus aŭ parolus pri “bovuko” aŭ alia “-uko”, neniu Esperantisto ne studinta la ANZED-on komprenus, kaj la ANZED maltrafus sian celon. — ■

² Mi ripetas: la tasko de nacilingva-Esperanta vortaro ne estas proponi novajn vortojn, sed registri la jamuzatan Esperantan vortoprovizion. *Boŝo* ne estas en *PIV* nek konata de la ekster-aŭstralazia Esperantistaro. — ■

as manon; “kotŝirmilo” ŝirmas kontraŭ koto; “manikŝirmilo” estas maniko kiu ŝirmas. “Arbŝirmilo” similas al “manikŝirmilo”. Aliflanke *PIV* havas “ventŝirmilo” por “plato el vitro por ŝirmi aŭtistojn k.a. de vento”. La arba afero ankaŭ estas ventŝirmilo — arba ventŝirmilo.

(38) “Whinge”: la difino de ANZED estas taŭga. Se la plendoj estas gravaj kaj trafaj, ili ne estas “plendaĉoj”.

(45) “Hongi”: oni povas diri same pri “manpremi”.

(46) “Leatherwood”: mi ne kredas ke la floroj estas plenaj de mielo. Pli taŭga estas “nektarohavaj floroj”.

(55) “Outback” = “back country”: maldense loĝataj distriktoj for de urboj.

Gramatikaj eraroj

La komentoj de Marcel temas precipe ne pri sintakso, sed pri vortfarado, aŭ la atendata provado de la kompilintoj verki difinojn kiel eble plej koncizajn (ekz-e 18, 19, 20).

(4) “Tujtuja”: “tujega” estas taŭtologio. Kio povas esti pli tuja ol tuja? Simile “unikega”, kaj “plenega” estas nelogikaj.

(5) “Brutpeli” estas pravigebla laŭ “partopreni”, preni parton. De kie venis “per”?

(9) Wells kaj Benson [kaj *PIV* - ■] havas “pulovero”; Butler havas “pulovro”, sed kiu uzas ĝin?

(14) “Milk run”: kiel menciite en la piednoto, “kurso” povas ankaŭ signifi vojlinion, ekz-e “kurso de ŝipo”, aŭ “poŝta kurso”, do kurso por liveri lakton povas esti “laktoliverista kurso”. Mi ne konas esperantan terminon por “run” en tiu senco. Iam mi uzis “ĵurnala rundo” por la laboro de knabo liveri ĵurnalojn. Eble “laktolivera rundo” taŭgas.

(27) Malgraŭ la ŝajna eraro, “ĝis la” estas ofte uzata mallongigo de “ĝis la revido”.

Malperloj

(ĉ) “Adverbo (por) modifi verbon” estas en ordo.

(d) “Denove” ankaŭ povas signifi “alian fojon”. Fakte pli ofte en la uzado ol “de kiam (ĝi) estis nova”.

Konkludo

Kompili vortaron estas malfacila tasko kaj neniam kontentigos ĉiujn. Mi gratulas al Ralph kaj Brian pro ilia bona laboro. Kompreneble ĝi ĉiam estos iomete plibonigebla. “Post ĉio, la unua devo de klerulo estas ĉiam esti preta reverki la enciklopedion” [Umberto Eco, *Serendipities – Language and Lunacy*, Phoenix, 1998]. □



POR RIDIGI VIN



— Ĉu ateisto povas aĉeti asekuron kontraŭ “agoj de dio”?

— Mi opinias ke kvin el kvar homoj trovas frakciojn malfacilaj.

— Mi ne havas bonan solvon, sed mi admiras vian problemon.

— Ĉu laboristoj de la firmao Lipton paŭzas por trinki kafon?

— Sur formularo por akiri aŭtomobilkonduk-licencon oni devas priskribi la hararkoloron. Kion skribu tutkalvulo?

- Se hodiaŭ la temperaturo estas nul gradojn, kaj morgaŭ estos duoble pli malvarme, kio estos la temperaturo morgaŭ?

- Kial gluo ne fiksas sin al la interno de la botelo?

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

22a JARKOLEKTO 2001

Informiĝu pri la okazontaĵoj en la nova 3a jarmilo pere de la internacia revuo MONATO. Ĝi raportas el ĉiuj anguloj de la mondo, tra la okuloj de lokaj loĝantoj kaj informos vin pri aspektoj kaj eroj kiujn aliaj naciaj kaj internaciaj revuoj en la mondo preteratentas. En la tuta Esperantujo ĝi estas unikajo, la nura revuo kiu plenumas la celon de Esperanto ĝisfunde: informi ne pri, sed per Esperanto.

AU\$72
(Aere +\$9)

ĉe la libroservo de
AEA



POR RIDIGI
VIN



Decidis Arturo kaj Oveno skiadi tutan semajnfino. Ili surmetis la necesajojn sur la varaŭton de Oveno kaj iris norden. Kelkajn horojn poste la vetero malboniĝis. Ili haltis antaŭ proksima biendomo kaj demandis al la belega sinjorino kiu malfermis al ili la pordon, “Ĉu eblas pasiĝi la nokton tie?”

“Mi bone komprenas ke la vetero estas terure malbonega, kaj ke mi estas tute sola en tiu ĉi grandega domo, sed mia edzo mortis antaŭ nelonge, kaj mi timas ke la najbaroj klaĉos se mi enlasos vin en la domon”, diris la belulino.

“Timu nenion,” diris Arturo, “ni tre volonte dormos en la grenejo, kaj se la vetero pliboniĝos, ni foriros tuj je la tagiĝo”.

La sinjorino konsentis, kaj la du viroj endormiĝis en la grenejo.

En la mateno la vetero estis multe pli bona, kaj Arturo kaj Oveno foriris kaj ĝuis tre bonan skiadon.

Proksimume naŭ monatojn poste, Arturo ricevis leteron de advokato. Daŭris kelkaj minutoj antaŭ ol li komprenis ke ĝi venis de la advokato de la belulino kiun li renkontis dum la skisemajnfino kun Oveno.

Li vizitis sian amikon, Oveno, kaj demandis, “Ĉu vi memoras la belegan vidvinon en la biendomo kie ni pasigis la

nokton dum nia skisemajnfino?”

Jes, mi memoras ŝin,” diris Oveno.

“Ĉu vi ellitigis en la mezo de la nokto, eniris ŝian domon kaj sekskuniĝis kun ŝi?”

“Jes,” diris Oveno honteme. “Mi devas konfesi ke tion mi faris.”

“Kaj ĉu vi uzis mian nomon anstataŭ vian propran?”

La vizaĝo de Oveno estis nun tute blanka kaj li respondis: “Jes, mi bedaŭras, mia amiko, sed tion mi faris? Kial vi demandas?”

“Ŝi ĵus mortis kaj testamentis ĉion al mi!”

[El *Tamen Plu*]

NOVE APERIS

Franz Kafta: *La metamorfozo*. Tr. Reinhard Hapuenthal. Chapecó (Brazilo): Fonto, 2000. 59p., broŝ.

Ĉi tiu novelo unue aperis en 1915, unu el la nemultaj verkoj de Kafka kiujn li permesis publikigi dum sia propra vivtempo. Kvankam en 1966 jam du aliaj tradukoj de *La metamorfozo* aperis, en tradukoj faritaj de Wilhelm Lutterman kaj de Mauro Nervi, Hapuenthal opiniis ke nova traduko endas.

La rakonto estas interesa, la presaĵo estas klara, la traduko estas vigla, la lingvaĵo iom eksperimentema.

Detala recenzo, verkita de via redaktoro, aperas en *Monato*. □



SKRIBAS LA LEGANTOJ



Skribas **Andreo J. PENK:**

Estimata samideano,

Komence mi ŝatas sendi al vi, kara Aŭstraliano, elkorajn salutojn de el la dorsa flanko de nia komuna terglobo, el Pruslando ;-), do el orient-norda parto de Germanio.

Antaŭ kelkaj tagoj mi atente observis per televidilo la eksterordinare impresgan solenan malfermon de Paralimpiaj Ludoj en Sydney. La “pli gravaj” eventoj de la grandaj Olimpiaj Ludoj antaŭaj ne estis tiom imponaj por mi.

Tamen oni diras ke la Someraj Olimpiaj Ludoj en la sama urbo estis la plej bonaj, la plej varmkoraj ekde la komenco de la nova olimpia movado ĝis hodiaŭ. Aparte ĝojigis min ke dum la vere solena malfermo la Aŭstraliaj Aborigenoj ludis tiom gravan rolon. Sed mi iomete konjektis ke la kaŭzo por tiu laŭdinda konduto povus nur esti penoj kontentigi la deziraĵojn de la internacia “altruista” komunumo, kiu fine alportas al via lando la bezonatan, eĉ deziratan monon.

Sed evidente mi estis tro pesimisma! En la plej multaj lokoj, kie antaŭe Paralimpiaj Ludoj okazis, tiuj ludis nur pli-malpli negravan rolon. Fakte ili estis iel nur piednotoj kompare kun la ordinara olimpia vivo de la koncerna urbo. Sed via konvinka akcepto de la sportistoj handikapitaj estis tiom elkora, ĝojiga kaj delikata, kiom neniam antaŭe. Ie mi legis ke la morala valoro de iu socio dependas de ĝia konduto koncerne al siaj malplimultoj. Do, granda respekto al vi!

Eblas ke via popolo ne estas unu el

la plej grandaj sub la suno. Sed evidente via popolo havas unu el la plej grandaj koroj de la mondo. Pro tio mi iom admiras vin. Aliaj “pli grandaj” popoloj preferas paroli ol agi.

En la celado al libereco la popoloj komencis persekutadi unu alian aŭ serĉadi pseŭdo-liberalajn kompromisojn inter la plimulto kaj la malplimulto, forgesante, ke ĉiuj kompromisoj estas maljustaj kaj ne-fortikaj, kaj ke honesta kaj fortika libereco povas esti atingita nur per absoluta justeco kaj egaleco, sed ne per modifado de kruda besta forto, por kiu ekzistas nur la demando “kiu kie super kiu kaj en kia grado devas regi.” (L. L. Zamenhof)

Skribas **Margaret Furness:**

Rompu la ĉenojn!

Ĉar la tero kaj ties enloĝantoj gravas al Esperantistoj, ni respondas tuj al petoj por helpo. Tamen, pro tio ni povas esti iloj por fiŝercistoj. Mi ofte ricevas ĉenleterojn retroŝte, kiuj petas helpon por io aŭ iu, sed multaj kaŝas “virusojn” aŭ “vermojn”. Eĉ tiuj, kiuj estas honestaj kaj helpindaj, povas esti senutilaj — ekzemple, petoj por poŝtkartoj por mortanta infano; sed la letero kapablas daŭre cirkuladi jarojn post la morto de la infano.

Mi ofte ricevas ŝercojn per la retroŝto, sed tiuj povas esti embaraso, ĉar mia retadreso estas en mia laborejo. Oni ne provizas la retsistemon (nek pagas min) por ricevi ilin. Mi eĉ ricevis informon pri kiel eltrovi kiom gajnas la laborejestro... Mi petas, ke ni ne plusendu tiajn kiel hundoj de Pavlov! Rompu la ĉenojn! □



El la Regionoj



Esperanto-Federacio de Kvinslando: Raporto pri la Semajnfino de Studo, 21-22 de oktobro.

Nur malgranda nombro partoprenis la semajnfino. Dankon al ĉiuj kiuj povis ĉeesti, de la Toowoomba kaj Brisbana Esperanto-Societoj. Estis tre bone ke kelkaj infanoj partoprenis – Drew, Regina, Angus kaj Logan (genepoj de Dianne, nia prezidanto); kaj ankaŭ Tahlia kaj Ruth, filinoj de Cathy.

Sabat- kaj dimanĉ-matene okazis ludoj kaj konversaciaj rondoj; sabato, posttagmeze okazis la kutima kunveno de EFK. Sabatvespere, ni ĝuis tre bongustan manĝon kaj ni devas dankegi al Marianne, Susan kaj Ira kiuj preparis ĉion por ni. Dianne kaj Sandra multe laboris pri la manĝoj dum la semajnfino, do multajn dankojn al ili ankaŭ.

Post la vespermanĝo, ni distriĝis per kantoj, teatraĵetoj kaj ŝercoj. Tri el la gejunuloj, Tahlia, Ruth kaj Regina, prezentis 2 amuzajn skeĉetojn – brave, knabinoj!

Dum nia kunveno, Hazel parolis pri la Afrika Fonduso. En julio ŝi partoprenis la UK-on en Tel-Aviv, kie ŝi aŭdis pri la problemoj de Esperantistoj en Afriko. Do ŝi proponis ke ni sendu donacon al la Afrika Fonduso. La membroj decidis donaci la monon ricevitan per nia budeto, “Alportu kaj Aĉetu”; feliĉe ni kolektis proksimume \$50, kiun Hazel sendos.

La venonta semajnfino de studo okazos ĉe Redcliffe dum marto 2001. Ni esperas vidi vin tie!

[El Brisbana Babilado]

Esperanto League of Western Australia: Estas mia plezuro informi vin ke ni nun havas *Patronon*. Tiu estas D-ro Peter Natrass, la Urbestro de Perth. Esperanto children’s peace artwork is on display at the UNAA art exhibition which opened on 3 Nov. at the Atwell Gallery. 29 November, the last of the current weekly re-runs of Trish O’Connor’s *Esperanto for Beginners* on Channel 31 Perth (also being shown in two other Australian Capital Cities).

[El *La Nigra Cigno* Nov. 2000]



POR RIDIGI VIN



DUM LA UK EN TELAVIVO

En salono Lapenna tute ne restis loko dum la prelego de Josef Shemer “Kio kaj kiu estas judo?”.

Tial kelkaj alvenintoj ne povis resti. Kiam meze de la prelego ies poŝtelefono sonoris, diris tuj la preleganto:

“Tio estas verŝajne unu de la kongresanoj, kiuj devis resti ekster la salono, do nun li deziras aŭdi la prelegon per la telefono.”

[El Eventoj]

Teroristo 1: Ni ne metis sufiĉan gluon sur la kovertojn de ĉi tiuj leterbomboj.

Teroristo 2: Ni devos malfermi kaj reglui ilin.

Teroristo 1: Se ni faros tion, ili eksplodos kaj mortigos nin.

Teroristo 2: Tute ne – ili ne estas adresitaj al ni. □

PRI LA ESPERANTA GRAMATIKO

de Donald Broadribb

(Parto 2: la verboj)

Efektive, unu el la plej rimarkindaj karakterizaĵoj de Esperanto estas ke ne ekzistas *aparta* verbosistemo.

— *s* uziĝas en Esperanto preskaŭ nur por formi verbon¹. Ĝi estas unu el la tre malmultaj eroj en Esperanto kiuj devas esti limigitaj al malgranda grupo da kombinaĵoj: *-a-s*, *-i-s*, *-o-s*, kaj *-u-s*. Por simpligi la aferon, ni kune diskutas ilin kiel la kombinaĵojn *-as*, *-is*, *-os*, *-us*².

Esperanto estas preskaŭ unika pro sia permeso ke tiu grupo da kombinaĵoj akompanu kiun ajn alian signifon. Ni rajtas diri: *em-is*, *kon-as*, *verd-is*, *rapid-os*, *komb-us*, *bros-us*, *fakt-is*, *nepr-as*, *ek-os*, kc. kc., senlime.

El la lingvoj kiujn Zamenhof konis, nur la Angla lingvo havas iom similan sistemon, en kiu principe preskaŭ ĉiu ajn vorto uzeblas kiel verbo, substantivo, adjektivo, adverbo, kc. Ekzemple, en la Angla ni diras *I run to catch a bus; the baseball player scored two home runs*. Ni povas diri: *go slow; he is very slow to catch on; slow and careful is the way to go; a slow boat to China*. Simile: *She likes to eat oranges; what are her likes and dislikes? Like minded people are hard to find*.

¹Tiu ligita morfemo estas uzata alimaniere nur en la interesa serio *ĉies*, *hies*, *nenies*, kc., aparte diskutenda.

²Oni jam frue rimarkis ke temas pri la kvin vokaloj kombinitaj kun sekvanta *s*; ĝis nur kelkaj monatoj antaŭ la oficiala publikiĝo de Esperanto, en la serio estis ankaŭ *-es*, sed ĝin forĵetis kvazaŭ lastamomente Zamenhof.

La lasta el tiuj ekzemploj tamen ekzempligas ke en la Angla lingvo la rajto malaperigi la “gramatikajn kategoriojn” estas tre limigita, kaj ofte la signifo neanticipeble varias. *Like* kiel verbo kaj kiel substantivo signifas “ŝat”, sed kiel adjektivo ĝi signifas “simil”.

Simile estas pri *book*: *Your editor's articles on Esperanto grammar will eventually appear in book form; He has written two books on psychology; When he books a plane, he likes to do it far in advance*. En tiu serio, la termino *book* strange ŝanĝas sian signifon.

Tiuj Anglalingvaj vortuzoj ne estas rekte tradukeblaj en la aliajn lingvojn konatajn de Zamenhof (Latina, Franca, Germana, Hebrea, Pola, kc.), do la frazoj estas gramatike reverkendaj en tradukoj. Tiurilate inter la okcidentaj lingvoj, la Anglalingva sistemo estas unika.

Kiom la Anglalingva verbsistemo influis Zamenhofon kiam li kreis Esperanton estas ofte diskutite, kaj mi ne emas pli diskuti pri tio nuntempe.

Estas klare ke la — *s* grupo en Esperanto paralelas la uzadon de *-o*, *-a*, *-e*, *-n*, *-j*. T.e., ĝi estas kombinebla kun kiu ajn alia morfemo/vortero en nia lingvo. Sed du neskribitaj reguloj estas jam de la komenco rimarkeblaj:

1. Ke *-s* devas ĉiam esti ligita al la vokalo *-a*, *-i*, *-o*, aŭ *-u*: *-as*, *-is*, *-os*, *-us*;

2) Ke *-as*, *-is*, *-os*, *-us* devas ĉiam lokiĝi plejlaste en normala kombinaĵo. (Konsekvence, ĝi neniam estas akcentita en la parolado — kio kaŭz—

as problemojn kiam la parolanto ne klare elparolas.)

Tre interesas ke la grupo *-as*, *-is*, *-os*, *-us* efektive ne konsistigas veran sistemon, kaj ne plene ĝustas paroli pri la “verbsistemo” en Esperanto. Anstataŭ esti aparta sistemo, verboj estas facile analizeblaj kiel ordinaraj er-kombinaĵoj: *bros-o*, *bros-a*, *bros-e*, *bros-us*.

Signife, *-as* indikas “nun-ag-econ”, *-is* = “estint-ag-eco”, *-os* = estont-ag-eco, *-us* = sentemp-ag-a ebleco. Ili ne havas precizan ekvivalenton en la etnaj lingvoj. Tio ne signifas ke ne eblas traduki ilin etnalingven, sed ke en traduko necesas gramatike reverki la frazojn en kiuj ili uziĝas.

Kiam ni rigardas la etnajn lingvojn konatajn de Zamenhof, ni vidas tre klare kiom nekutimaj la verboj en Esperanto estas.

Ekzemple, la klasikhebrea vorto *halakti* analizeblas kiel *halak-ti*: *halak* = nia Esperanta “ir”, kaj *-ti* = “mi”. En tiu lingvosistemo la verboj ne esprimas tempon, tion devas esprimi la kunteksto.

Alikompare: la Franca vorto *jire*³ analizeblas *ĵ-e* = “mi –os”, kaj *ir* = nia “ir”.

Kontraste, la Hispana termino *ire* – denove, akcentu la lastan vokalon – konsistas el *ir* = nia “ir”, kaj *-e* = “mi –os”.

Alia ekzemplo: la Germana *ih verd* *ge'en*⁴ analizeblas “mi os iri”.

Lastekzemple: la Angla *aj ŭil go* (skribe: I will go) analiziĝas: “mi os ir”.

Tiuj etnalingvaj ekzemploj de verboj ne nur montas la variadon de la verbsistemoj etnalingvaj, sed kaŭzas

ankaŭ multe da konfuzo se ni penas transmeti tiujn sistemojn en Esperanton.

Sed se, anstataŭ pensi laŭ la tradiciaj kategorioj “verbo” kaj “verbfornoj”, ni pli simple pensas pri la ebla ligi temp+ag-indikilon al alia ero por formi plenan “vorton”, ni pli proksimas al la spirito de Esperanto. Do ni pli Esperantospirite analizas *tagiĝas* kiel kombinaĵon konsistantan el tri eroj: *tag*, *iĝ*, *as*, sen trudi al tio kategoriojn kiaj “radiko”, “sufikso”⁵, kaj “verb-finaĵo”. Laŭ sia senco, la kombinaĵo signifas: “lumtempperiod” + “ekest” + “nuntemp-ag”.

Ankaŭ nekutime en la okcidentaj lingvoj estas ke tia kombinaĵo povas esti tute sola. “Tagiĝas” povas esti tute kompleta frazo, sen la bezono aldoni ion alian. Laŭ la tradicia gramatikanalizo: neniu subjekto estas bezonata por tiu verbo. En Esperanto oni povas fari tion per kiu ajn verbo, almenaŭ teorie.

Ekzemple: *Sonoras*. (Pli malpli = *Oni aŭdas sonoron*.) Kaj *Malfruas*. (= *Estas malfrue*. ≈ La tempo estas malfrua.)

Tradicie ni klasifikas ankaŭ vortojn formitajn el ero+*u* kaj ero+*i* kiel verbojn, kvankam estas iom dube ĉu tio estas ĝusta, almenaŭ en Esperanto.

-u pli-malpli indikas ke urĝas iu ago. Kelkrilate ĝia signifo similas al tiu de *dev*, kelkrilate al *end*, ofte ĝi indikas ordonon aŭ fortan deziron pri la efektiviĝo de iu ago. Ankaŭ *-u* havas iom unikan utiliĝon en Esperanto, tiel ke ne eblas trovi precizan

⁴Skribe: *Ich werde gehen*. La ‘ indikas tre mallongan vokaletan.

⁵Pli ĝuste, la *iĝ* estas “infikso”, laŭ la tradicia analizo.

³Skribe: *ĵirai*. Malsimile al Esperanto, akcentu la lastan vokalon.

analogon en la etnaj lingvoj. Ni rigardu diversajn ekzemplojn de la utiliĝo de *-u* por akiri pli klaran senton pri ĝia signifo:

Se la kato deziras manĝi, ĝi iru al sia manĝobovlo.

Ŝi gestis ke li venu al ŝi.

Ĉu ni sidiĝu?

Li petis ke mi verku artikolon.

Mi bezonas akiri koverton por ke mi povu enpoŝtigi la leteron.

Telefonu min post la dudeka horo.

Ĉu vere mia artikolo nepre estu malpli ol dudekpaĝa?

Enpoŝtigu la leteron por ke ĝi atingu min antaŭ vendredo.

Ankaŭ aliaj uzebloj elpenseblas; la ĉisupraj ekzemploj ne indikas ian limigon al la utiliĝado de *-u*. Rimarku ke *-u* ja indikas ian agon (se “esti” vere signifas ian agon), sed ĝi ne indikas tempon, do ĝi grave diferencas de la “*-as, -is, -os, -us*”-serio.

Kiam temas pri *-i*, oni tradicie nomas ĝin infinitivformilo. Tiom duba estas ĝia kunkategoriigo kun *-as, -is, -os, -us*, ke multaj Esperantaj gramatikistoj plurkategoriigas ĝin. Por Anglalingvanoj ĝi estas ofte perpleksiga, ĉefe ĉar en la Angla ne ekzistas la kategorio infinitivo. Simile al *-u, -i* indikas ian agon, sed ne indikas tempon.

Ofte en la Angla la vorteto *to* estas uzata tuj, aŭ ne tre malproksime, antaŭ la koncerna verbo aŭ subfrazo, en tekstoj kie en alia lingvo ni eble antcipus trovi infinitivon. Ekz: *I want to go home now.* = “Mi volas hejmeniri nun”. Sed egalofte ne: *Tell him to go and bring in the paper.* = “Diru al li ke li eliru por enporti la ĵurnalon”. Kaj ofte ankaŭ inverse, Esperanta *-i* ne nepre signifas *to...*: “Pensi kaj fari estas du tute apartaj aferoj” = *Thinking and doing are two totally different things.*

Oni preskaŭ povas diri ke *-i* estas uzata en Esperanto kiam oni deziras

indiki agokoncepton sentempe kaj senkategorie: t.e. nek substantive, nek adjektive, nek adverbe, nek verbe.

Ni turnu nin nelongve al alispeca temo:

Jam estas plurfoje diskutite de diversaj aŭtoroj ke la participoj Esperantaj tute ne estas parto de la verbo-sistemo. En *ESK 38*, Marcel Leereveld koncize kaj ĝuste prezentis la aferon. Krome, ankaŭ lastatempe aperis tre konsultinda libro de Geraldo Mattos, *Apartaj mondaj: verboj kaj participoj*, kiu tre detale diskutas la missupozon ke la participoj estas iaj verboformoj. Do ne necesas ke mi skribu pri ili detale ĉi tie. Nur direndas ke temas pri la morfemj/vorteroj *-at / it / ot-* kaj *-ant / int-ont-* al kiuj oni povas ligi la ordinarajn *-o, -a, -e*, plus aŭ sen *-j* kaj plus aŭ sen *-n*.

Mi ne daŭrigos mian artikolon, ĉar intertempe aperis nova libro *En la komenco estas la VORTO* de Geraldo Mattos (eld. Fonto, 2000), kiu kaj detale kaj teknike pritraktas la strukturon de Esperanto laŭ la strukturista skolo, do interesatojn mi direktas al tiu verko. □

TREVOR STEELE

ricevis la Premion Osiek por la jaro 2000, pro sia originala verko *Falantaj Muroj*.

La premio, €400, rekompencas vivantan aŭtoron pro publikigita verkaĵo nefikcia aŭ pro grava traduklaboro.

En la jaro 2000, 18 verkaĵoj estis proponitaj por la premio. La 21an de julio, dum la IEK en Motovun, Kroatio, sekreta voĉdonado atribuis la premion al Trevor Steele.

Ni forte gratulas nian amikon kaj membron! — La Redaktoro de *Esperanto sub la Suda Kruco*.

AŬSTRALIAJ KAJ NOV-ZELANDAJ ESPERANTISTOJ: E-POŜTAJ KAJ RET-ADRESOJ

Listo kontrolita la 4an de Novembro 2000.

Kelkaj adresoj estas ellasitaj, laŭ peto de la koncernuloj.

La indiko [Unikodo] post retadreso indikas ke tekstoj ĉe tiu sito utiligas Unikodon por prezenti la Esperantajn literojn.

(*Macintosh-uzantoj: Ni rekomendas uzi la retlegilon Netscape 6. Ni trovas tiun retlegilon tre stabila, kaj ĝi bone reproduktas Unikodon. Internet Explorer por Macintosh kaj iCab ne reproduktas Unikodon.*)

Esperanto sub la Suda Kruco: donaldbroadribb@mac.com

http://www.netword.com/*esk aŭ www.poboxes.com/esk [Unikodo] **Asocioj:**

Aŭstralia Esperanto-asocio: <http://www.Esperanto.org.au/> [Unikodo]

Libroservo de AEA: libroservo@ans.com.au

<http://www.ans.com.au/~libroser/>

Korespondaj Kursoj: <http://tmba.design.net.au/hazgreen/>

Esperanto Federation of NSW: esperfed@ans.com.au

Esperanto-ligo de Okcidenta Aŭstralio: esperanto@iexpress.net.au; <http://www.iexpress.net.au/~esperanto> [Unikodo]

Esperanto-societo de Suda Aŭstralio: www.ozemail.com.au/~esperanto [Unikodo]

Esperanto-federacio de Victoria: Broadbent, Henry & Betty:

henryb@peninsula.hotkey.net.au

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio: <http://www.geocities.com/esperanto-nz> [Unikodo]

Individuoj:

Ahrens, Rolf: rahrens@ecn.net.au

Anderson, Kay: kjand@ozemail.com.au

Ben Van, Poppel: benny@netspace.net.au

Bertok, Zoltan: bertok@nlc.net.au

Bird, Peter: romney@camtech.net.au

Bishop, Alan: alan.bishop@education.monash.edu.au

Bishop, Jenny: esperanto@education.monash.edu.au

Braham, Frank: fbraham@aol.com

Bray, Agnes: agnesbray@xtra.co.nz

Broadbent, Henry & Betty: henryb@peninsula.hotkey.net.au

Broadribb, Donald: donaldbroadribb@mac.com

http://www.netword.com/*broadribb [Unikodo]

Brose, Garnet Charles: garnet@powerup.com.au

Cooper, Jonathan Michael: agjonath@ozemail.com.au

<http://www.ozemail.com.au/~agjonath/>

Couch, Jim: libroservo@ans.com.au

Curry, Brian: brianca@acslink.net.au

Desailly, Paul: pdesailly@hotmail.com

Dewar, Dave: gddewar@ihug.co.nz

Enderby, Kep: kependerby@bigpond.com

Ernesto, Bhaktiulo: eskkon@hotmail.com

Felby, Bob: esperantobob@one.net.au

Fox, Brian: brianandjackie@abztrak.co.nz

Fox, Jackie: brianandjackie@abztrak.co.nz

Franklin, Owen: oveno@hotmail.com

Friedman, Paul: paul.friedman@xtra.co.nz

Furness, Margaret: furnessm@wch.sa.gov.au

Gallagher John: abcetc@ozemail.com

<http://www.ozemail.com.au/~abcetc> [*Unikodo*]

Gates, Ronald: rgates@metz.une.edu.au

Giloteaux-Else, Nicole: nicole@cryogenic.net

Gradussov, Shirley: shirleyg@eon.net.au

Grant, Alan: agrant@gil.com.au

Grasby, Dallas: dallas.grasby@adelaide.edu.au

Gravatt, Howard: hgravatt@ihug.co.nz

Green, Hazel: hazgreen@tmba.design.net.au

Harry, Ralph: rlharry@ozemail.com.au

Harvey, John: harveyclan@hotmail.com

Hayward, Mark: mark.hayward@nrma.com.au

Heinze, Bernard: franciska@bigpond.com

Holton, Tudor: tudor@alphalink.com.au

Horvath, Sandor: shandorhorvath@unisa.edu.au

Inglis, Margaret: minglis@netspace.net.au

Jansen, Anthonia: hank@xtra.co.nz

Kanački, Svetislav: stevskank@hotmail.com

Kane, Daniel: daniel.kane@mq.edu.au

Kendal, Bradley: bkendala@hotmail.com

Krageloh, Christian: krageloh@hotmail.com

Laing, William: wilaing@xtra.co.nz

Lee, Kam: mpavlova@telstra.easymail.com.au

Linnane, Brendan: blinnane@vtown.com.au

Loneragan, Owen: owlono@internetexpress.net.au

Looman-Breeze, Olive: olive.looman@clear.net.nz

Lutz, Miranda: lutz@alphalink.com.au

Manley, Terry: teren@mail.ans.com.au

Massam, John: john.massam@multiline.com.au;

<http://www.multiline.com.au/~johnm/>

Mccarney, Debra: debra1@iinet.net.au

Mcdonald, Bradley: neelam@voyager.co.nz
Mcdonald, Benita Bianca: spiono_009@yahoo.com
Mendelawitz, Alan: alano@global.net.au
Mills, John: jmills@southwest.com.au
Mojarrabi, Bahram: bmojarrabi@hotmail.com
Monostori, Sandor: sandor@access.net.au
Mooney, Jay: agrant@gil.com.au
O'Connor, Trish: trish_o_connor@hotmail.com
Oliveira Couto, Igor De: igor@pixelmedia.com.au
Parkinson, W. Dudley: parkinson@trump.net.au
Payne, Vera: vpayne@cygnus.uwa.edu.au
Pease, Dennis: dbpnz@bigfoot.com
Pehar, Zxelimir: zpehar@hotmail.com
Perkins, Howard: howardp@web.de
Poulson, David: dpoulson@iinet.net.au
<http://www.geocities.com/wallstreet/1916>
<http://www.suite101.com/welcome.cfm/esperanto>
Richardson, Tony: mpower@wave.co.nz
Ridout, Sheryl: pmont@perthmontessori.wa.edu.au
Roberts, Richard: lonfa@clear.net.nz
Rogers, Don: rogers@ihug.co.nz
Ryan, David: kiwimex@xtra.co.nz
Schultz, Rosalie: Rosalie_Schultz@hotmail.com
Scott, Chris: chris.scott@nzhis.govt.nz
Sevicke Jones, Neville: neville.jean@paradise.net.nz
Skiba, Larry: larry.skiba@xtra.co.nz
Smith, Kevin Goodhope: keving@dbworld.net.au
Smith, Petro: petro_smith@bnz.co.nz
Sills, Neill: astrodog@senet.com.au
Sutton, Gwenda: gwenda.s@ihug.co.nz
Touballe, Franciska: franciska@bigpond.com
Turvey, Alan: turvey@fai.com.au ?? **espero@zip.com.au**
Turvey, Edna: ednat@sydney.dialix.com.au
Voros, Joseph: jvoros@ozemail.com.au
<http://www.ozemail.com.au/~jvoros/bio-esp.html> [Unikodo]
Vos, Penny: penivos@yahoo.com
Wechner, Bernd: b.wechner@aitec.edu.au
<http://garlic.aitec.edu.au/~bwechner/>
Williams, Satto & Ira: satto@yahoo.com
Wybraniec, Zbigniew: esperlando@yahoo.com 5
Zbik, Wojciech Pawel: paserchjo@excite.com

NOVA JARO NOVA JARCENTO NOVA JARMILO

de Odlo Bokserp

La kronikistoj de la mondo bonvenigas vin al la nova Kristana jarcento 21a, kaj la tria Kristana jarmilo.


La bibliohistoriistoj, kiuj asertas ke la nova jarcento kaj la nova jarmilo komenciĝis antaŭ kvar jaroj, fermas siajn okulojn kaj murmuris: “ΠΑΤ ΕΡΑΦΕΣΑΥΤΟΙΣΟΥΓΑΡΟΙΔΑΣΙΤΙ ΠΟΙΟΥΣΙ”

Sed ilin atentis neniuj, ĉar kompreneble kvar jarojn post la evento, neniuj interesiĝas pri la afero.

Tamen, oficiale la novaj jarcento kaj jarmilo komenciĝis je la 1-a de la aktuala monato, kaj tio donas al ni ĉiuj oportunun denove festegi la novan epokon. Do elverŝintu ĉampanon, kisintu vian amikon aŭ amikinojn, gejan aŭ negejan laŭ ties gusto, celebru la nefiniĝon de la mondo neokazintan⁴ je la lasta noktomezo post la lasta tago de la lasta jarmilo, skribu por viaj posteuloj noton ke la venonta jarmilsanĝo okazos je la noktomezo inter la 31a de decembro 3000 kaj la 1a de januaro 3001 (aŭ inter la 31a de decembro 2997 kaj la 1a de januaro 2998, laŭ via prefero), ridu pri viaj amikoj kiuj stokis amasegon da ladskatoloj da tomatosaŭco, fromaĝoj, kaj faskoj da spageto kontraŭ la kaoso kiu karakterizas neeviteble la finon de la mondo, kaj kiujn ili devos manĝi dum la mil sekvaj jaroj ĉar la mondo ja ne finiĝis malgraŭ ilia certeco, kiu, efektive, montriĝis malfacila, kalkulu la nombron da vortoj en ĉi tiu alineo³, dividu per la nombro da literoj en la alineo², skribu la rezulton per Romiaj numeraloj, kaj danku

nian Reaktoron ke li devigis min meti punkton tuj post ĉi tiu signo:¹

Kaj fine, por plenigi la ekstran spacon ĉi tie ĉe la fino de mia artikolo, jen foto kiun mi mem faris pri la satelito *Europa*, kiu ĉirkaŭiras Jupiteron kaj eble havas akvon sub sia surfaco.



¹ Efektive, skribi tiel la kalkulon neblas, ĉar la respondo, 0.(aŭ ,)212199+, ne estas skribebla per la Romia sistemo, kiu ne uzis decimalojn. — ■ (Sed mi ne volas ofendi Odlon atentigante lin pri tio. — ■) (Nek nulojn. — Odlo.)

²897.

³191.

⁵Mi ne scias, demandu al Akademiano. — Odlo.

⁴Ĉu tiu esprimo ne estu “okazintan”, ĉar alie temus pri dufoja ne-, ĉu ne? — ⁵Kaj kia longega frazo!!! — ■ □

AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO:

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: Ron Gates, Wanga-rang, MSF 2001, Armidale NSW 2350.

☎ kaj faksilo: (02) 6772 3856.
rgates@metz.une.edu.au

Vicprezidantoj:

Vera Payne, 36 Donegal Rd, Floreat Park WA 6014.

vpayne@cygnus.uwa.edu.au

Jenny Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122.

jennybishop@education.monash.edu.au

Sekretario: Bob Felby, 6 Dorset St, Semaphore Park SA 5019.

☎ (08) 8242 1460.
esperantobob@picknowl.com.au

Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

☎ (03) 9807 8589.
minglis@netspace.net.au

Vickasisto: Dianne Lukes, c/o Post Office, Meringandan Qld 4352.

NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO:

<http://www.geocities.com/esperanto-nz>

Prezidanto: Bradley McDonald, PO Box 12 103, Auckland 1135.

☎ 09 579 4767, faksilo 09 579 1070.
neelam@voyager.co.nz

Sekretario: Howard Gravatt PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, New Zealand.

☎ 09 626 6129.
hgravatt@ihug.co.nz

Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035.

☎ 09 817 8244.
brianandjackie@abztrak.co.nz

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

AŬ\$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familianoj] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membro: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la Kasisto de AEA: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$26. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: €23.70, pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2001 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas ©2001 de la Aŭstralia kaj la Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de ESK estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac DV SE, la programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook 9.5 sur 11. La reteldono estas preparata per Power Mac 7200, kaj Acrobat.

TRANSLATION COMPETITION

Contributed by Marcel Leereveld

This, our first translation competition of the third millennium, is open to all readers of *Esperanto sub la Suda Kruco*. Contest entries are to be sent either by e-mail to the editor at the address: donaldbroadribb@mac.com or by regular mail to: Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302, Australia. To be considered for the competition, translations must reach the editor by February 16. The authors of the three best translations, as judged by the Editor, will each receive an Esperanto book to be chosen by the Editor.

Note for translators: Remember to use the metric system in Esperanto, and to avoid using English idiomatic expressions or English turns of phrase in your translation.

The text to be translated:

15 May 1998

Kind Counsellors!

I write to you in the hope that you may be able to do something about the dog pest in the Shire, or at least in my area. I live in the old and beloved Shire of Sherbrooke.

All my abutting and near neighbours are very nice people; that is why I do not want to embarrass them with special attention in this letter, nor to dob them in, and so I write this letter anonymously. But they all have a dog, except one. And they love their dogs immensely. I love animals too, including dogs.

Of my seven neighbours who have a dog (I have a large block), only three keep their dog always inside their fence and never let it roam on the street. (One of them would be too dangerous, anyway, and wants to devour me every time I come close to its fence.)

A few years ago I had an eighth neighbour with a dog, a little further away. That dog was always outside their property, and since it came to our backyard to dig deep holes under our daughter's temporary rabbit hutch, and not knowing at that time that it belonged to a neighbour, I took it twice to the pound, and the owner had to pay twice a hundred dollars. The second time the man at the pound told me whose dog it was, but it never came back again.

The remaining four neighbouring dogs love to visit our property, mostly from the road, to deposit their shit on our always neatly cut lawn and to eat our cat's food, which during the daytime is outside. Our neighbours have cats, too. They like our garden, but mostly for the food.

One of the dogs is very small, aggressive (not to her owners), and comes whenever it is let loose. Its shit does not worry us too much, since it is small, and normally does it where we don't walk. Two years ago I asked the owner to put up a fence (300 feet) to keep their dog on their land. So he did, but he forced me to pay half of it. The stupid contractor, however, used the wrong wire netting, so that that dog can still get through it. That was several hundreds of dollars down the drain. Our other neighbours used proper fencing material to keep their dogs in (during some time of the day, at least), and did not let us pay at all.

The dog of our closest neighbours is lovely, too, especially to her owners. She is old, but very persistent in her shitting habits, when she is let out onto the street. That happens mostly in the morning and in late afternoon, so that she can do her ablutions (on our land, if possible). Although her owner and his neighbour have fine lawns extending onto the nature strip, she does not want to use that, but prefers our large lawn. For a few years there was no fence between us, so she came in twice a day for her ablutions. My wife picked the shit up and threw it under the trees, in the beginning. But since our large garden dries out in summer very much, I have six hoses dripping water onto the (many dozens of) trees and shrubs, and change them three times a day. That means treading in the dog shit now and then, especially in the dark, and having to wash my hands whenever I have touched the hoses, which, of course, drag over the shit. After having blocked that part of the fence with wire netting where she came in, she took the trouble to walk over the road and through my drive entrance, to do it on our lawn. Then I installed a gate, which is a nuisance since we have to open and close it whenever we or visiting relatives or friends want to go through. Since the dog in question could not get through our gate, she walked further down the road and entered my other neighbour's property (they have no dog), not to shit on their nice lawn, but to get through the prickly bushes from there onto our lawn, and near our kitchen entrance, for her ablutions. So I had to build an impenetrable fence there too, which now keeps her out.

You would expect that dog to do her business on our lawned nature strip, but no, she leaves that to the two other dogs of our two neighbours opposite. They, too, liked to use our lawn, although not persistently. Besides, one of them has acres of its own, but sits generally near their entrance on the road side. Well, these two dogs don't come very often, but all the same they now and then do their shitting on the nature strip next to our entrance, and just there where the paperboy every morning throws our paper. The paper does not need that shit: there is already plenty of shit in it about our politicians. And it is not very hygienic either. So I may have to fence off the nature strip, with a special anti-shit permit from the Shire.

But we take all that to keep on good terms with our neighbours. Al-

though I can't understand the foreign mentality of one neighbour, who expects that we have his little dog around our house during some time every day. And we are tired of the constant getting out of the car, then opening the gate, then getting into the car, then driving six metres, then getting out of the car, then closing the gate, then getting into the car again, and then finally being able to fasten our seatbelts.

But does the Shire do enough about the dog problem? I doubt it.

Anonymous, to protect our neighbours.

ESPERANTO INTERNETTING FOR BEGINNERS

by Donald Broadribb

Esperanto is in very wide use on the Internet. Using Esperanto on the Internet is a simple matter. Here's the lowdown:

e-mail: The e-mail system is one subdivision of that giant vague worldwide system we call the Internet. To use e-mail you need a computer, a modem, and an e-mail program. (There are also lots of Internet cafés, Telecentres, and Internet kiosks around for people to use who do not have their own equipment).

There is a vast number of e-mail computer programs. They vary a great deal in regard to how well they handle anything other than straightforward text typed using the ordinary English alphabet.

For this reason, Esperantists generally substitute cx, gx, hx, jx, sx, and ux for ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, and ŭ, when sending e-mail. Some prefer to use ch, gh, hh, jh, sh, and just a simple u or w. Generally the x or the h is lower case, so Ĉ is represented by Cx or Ch, Ĝ as Gx or Gh, etc. A few Esperantists prefer some other method of their own devising.

To send e-mail you need to know the e-mail address of the person concerned. A list of those Esperantists in Australia and New Zealand who wish to have their e-mail addresses published is printed in the current issue of *Esperanto sub la Suda Kruco*. You can tell an e-mail address by the fact that it uses the symbol @ somewhere in it.

Quotation marks, apostrophes and other symbols are not handled the same way by all computers and e-mail programs. Normally simple straight ' or " should be used, and only the letters and symbols found on a very ordinary English language typewriter keyboard. This is because the e-mail system was developed using only those, due to the primitive state of transmitting computer material over telephone lines when the Internet was first set up.

The Web: Actually, the World Wide Web (known simply as The Web, and abbreviated as www) is only one part of the Internet, though most users do

not know that. Addresses on the Web always start with **http://www**.

Some basic Web-speak terms:

URL simply means an Internet address.

To surf the Web means to look at materials on the Web.

A *Web page* is material someone has made available on the Web for people to look at.

A *Web site* is the sum of the material to be found at a Web address.

Encryption or a *secure site* means that a special code is used by the computer — often without your having to do anything about it — to allow only authorized people to read it, for instance when you send an order by the Web to a commercial firm.

A *browser* is a computer program that lets you read material that is on the Web. All computers sold nowadays come with one or more browser programs already installed. The best known browsers are named *Internet Explorer* and *Netscape*, but there are dozens more in use.

All the browsers should, in principle, be able to let you use the Web equally well, but in reality each has its own idiosyncrasies. As a result, when people use the Web, they usually start out with one browser and then switch to another browser if some particular Web material does not appear properly — or even at all — on their computer screen.

The reason some material shows up better when you use one browser rather than another, is that many people who put material onto the Web don't fully know how to do it properly, so they make basic mistakes. Any particular browser can manage to handle some mistakes, but not others. No particular browser is better than any other, each has its own strengths and weaknesses.

Commercial enterprises also often make very faulty Web pages, and any particular Web page may show up very differently depending on which browser you happen to use. Web pages are able to show pictures, texts in many languages, and all sorts of special material.

There is no good reason for Esperanto sites not to show the Esperanto letters *ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, and ŭ* properly. Most Esperanto web pages use Unicode, which all modern computers and some browsers handle very well.

Unicode works automatically if you are reading Esperanto on a computer that uses Windows 95, 98, or 2000; or Macintosh OS 8.6, OS 9, or OS X. You need to use the current version of *Internet Explorer* on a Windows machine, or the new *Netscape 6* on either a Windows or a Macintosh machine. Both of these browsers are made available for free, so it is easy to read Esperanto on the Web nowadays.

Happy surfing!